

Oni povas rimarki la diversecon de la aperturoj. La vilao "Marguerite" sola kaj originala verko de la arkitektoj, Gutton et Hornecker, pro ĝia regiona novnormanda stilo.

Vilao "Lang" 1905-1906

1 Boulevard G.Clemenceau

Arkitekto : Lucien Weissenberger



Situanta ĉe la vojkruciĝo de la strato "Colonel Renard" kaj de la bulvaro

"G.Clemenceau", tiu vilao konsistas el du ortaj partoj :

- la laŭlonga kvaretaĝa parto enhavas la akceptsalonojn kaj la dormoĉambrojn .

- la transversa parto la ŝtuparoŝakton ; tereage, maldekstre troviĝas la kuirejo.

La tajlita kalkoŝtono kaj la muelŝtono estas uzitaj por la konstruado.

La vitralo, la ligno, la forĝita fero, kaj la kolora briko por la ornamado.

La alturno de ruĝaj kaj grizaj brikoj kaj la larĝa bendo el tajlita ŝtono kaj ĝiaj paneloj de damtabulo el kuirita tero gajigas la fasadojn.

La elstara balkono apogiĝas sur mureto el muelŝtono kovrita de tajlita kalkoŝtono.

Ĝia strukturo de kurbaĵoj el ligno utilas por subteni la terason.

La plej mirinda estas la alta tegmento, kiu elstaras antaŭen.


Vilao "Frühinsholz" 1908-1910

77 avenue du Général Leclerc

Arkitekto : Léon Cayotte

Vitraloj : Jacques Grüber

Konstruita de 1908 ĝis 1910 por Adolphe Frühinsholz, barelisto, kiu ekzpoziciis gigantan barelon (9,20 metroj diametra, 9,25 metroj longa kaj 4200 hektolitroj enteneca), dum la universa ekzpozicio en 1900, en Parko Sankta Maria.



Konstruita el kalka ŝtono, tajlita ŝtono, kaj muelŝtono (subkonstruaĵo kaj mureto de la ĉirkaŭbarilo), ĝi enhavas kvar nivelojn : subteretaĝon,

teretaĝon kaj du etaĝojn (la lasta estas subtegmento).

La ardezo estas uzata por la tegmento, kiu montras kvar deklivaĵojn kaj plurlateran turpinton.

Skulptaĵo, ferornamaĵo, vitralo kaj mozaiko ornamas la domon per

- vegetalaj elementoj, kiaj kverkofolioj (en la kadro de la aperturoj, en la gablo de la granda tegmentofenestro, en la balustrado de la ŝtuparo) aŭ floroj (en la mozaiko de la ŝtuparoŝakto) - geometriaj figuroj (krado de la teraso de la elstara balkono kaj de la ĉirkaŭbarilo).

Nova Arto en Nancio

Itinero n° 4

La parko de "Saurupt"



En 1901, Jules Villard deziris krei ĉirkaŭ sia kastelo, domaron-ĝardenon "inter urbo kaj kamparo", laŭ la stilo "nova arto".

La projekto de privata parko kun krado kaj gardisto estis komisiita al la arkitektoj Emile André kaj Henry Gutton. Nur ses vilaoj, el la cent planitaj, estis konstruitaj.

La projekto estis modifita por allogi pli malriĉan klientaron ; la antaŭplanitaj vilaoj estis anstataŭitaj per limmuraj domoj.

Loĝio de la domgardisto 1902

2 rue des Brices

Arkitektoj : Emile André kaj Henry Gutton



Situanta ĉe la vojkrucio de la stratoj "Général Leclerc" kaj "des Brices", tiu loĝejo similas kampdometo.

Ĝi konsistas el du niveloj : volba kelo kaj teretaĝo. Sur la orienta fasado, impona kameno interrompas la tegmenton kaj signas la limon inter privata kaj publika lokoj.

La subkonstruaĵo estas el tajlitaj ŝtonoj, same la kadraĵoj de la fenestroj, la murelstarajoj kaj la rando de la tegmento.

La muroj estas konstruitaj el muelŝtono.

Aliaj materialoj estis uzataj :

- la ardezo por kovri la tegmenton.
- La ligno por la apogiloj de la elstartegmento, la fenestroj kaj la markezo supre de la pordo.
- La glazura briko por ornami la kamenon kaj la aperturojn.
- La forĝita fero por la kradoj de la fenestroj.

Vilao "Les glycines" 1902-1904

5 rue des Brices

Arkitekto : Emile André



Konstruita en 1902 por Charles Fernbach, negocisto pri vinoj, tiu domo montras 4 nivelojn.

La uzataj materialoj estas :

- ▲ La tajlita ŝtono en la eksteraj muroj.
- ▲ La muelŝtono en la subkonstruaĵo kaj la ĉirkaŭbarilo
- ▲ La briko por reliefigi la arkojn de la fenestroj.
- ▲ La ligno en la fenestroj en la balkonoj kaj en la apogiloj de la elstartegmento.
- ▲ La forĝita fero por la kradoj (fenestroj, pordo, balkonoj kaj ekstera barilo).
- ▲ La ruĝa tegolo por kovri la tegmenton de la vilao.

La naturo inspiras la ornamaĵon : formo laŭ flugilpapilio de la aperturoj, ferforĝitaj tulipoj de la balkonkradoj, vegetalaj formoj en la kradoj de la fenestroj kaj de la pordo.

Vilao "Roches" 1904

6 rue des Brices

Arkitekto : Emile André

La vilao situas ĉe la vojkrucio de la stratoj "des Brices" kaj " du Colonel Renard".

Ĝi enhavas du paralelipedajn, kunigitajn partojn.



La ruĝa briko kaj la tajlita ŝtono mildigas la malgajecon, kiun oni sentas pro la muroj el muelŝtono.

La ruĝaj brikoj estas uzataj por la supraĵo de la aperturoj, por la elstara linio sube de la pentrita friso kaj por la romba ornamaĵo de la kamenoj.

La tajlita ŝtono estas videbla en la modluro inter la subteretaĝo kaj la teretaĝo, en la supraĵo de la aperturoj kaj en la kamenoj.

La vilao estas ĉirkaŭita de barilo fare de mureto kaj ĝiaj lignaj stangetoj kaj de pilieroj el muelŝtono. Du grandaj floroj el emajla grezo ornamas la du pilierojn de la enirejo.

Vilao "Marguerite" 1903-1905"

3 rue du Colonel Renard

Arkitekto : Joseph Hornecker

Tiu vilao estis mendita de Aimé Prost, inĝeniero ĉe la salminejo en Bosserville.



Tiu malsimetria konstruaĵo (kubo al kiu oni tranĉis 2 eĝojn, nordoriente kaj nord-okcidente, kaj aldonis rondan turon sud-okcidente) montras

- kvar nivelojn (subteretaĝon, teretaĝon, unuan etaĝon kaj subtegmentan etaĝon)
- du porĉojn (unu ĉefan kaj alian por ofica servo).

Konstruita el muelŝtono, ĝi estas ornamita per :

- la tajlita ŝtono kaj la briko (aperturoj, ĉefa porĉo, kamenoj kaj modluro inter la subteretaĝo kaj la teretaĝo)

- La ligno (belvedero, porĉoj, balkonoj, apogiloj de la elstartegmento kaj trabarmuro de la orienta fasado kaj de la unua etaĝo de la turo).

- la forĝita fero (kradoj de la fenestroj kaj de la ĉirkaŭbarilo).